# TESTO

*Elektu el la kvar proponoj la gramatike kaj leksike ĝustan solvon kies literon bv. enskribi en la skemon, troviĝanta fine de la testo.*

**1) Mia profesorino loĝas ............ la Norda Maro.**

| | |
|---|---|
| **A**: ĉe | **B**: en |
| **C**: sur | **D**: proksime |

**2) Mi aĉetis du ......................**

| | |
|---|---|
| **A**: freŝa panon | **B**: freŝajn panojn |
| **C**: dolĉa ĉokoladojn | **D:** dolĉan ĉokoladon |

**3) La sepa monato de la jaro estas ……………........**

| | |
|---|---|
| **A**: junio | **B:** julio |
| **C**: antaŭ la sesa | **D:** tuj post la kvina |

**4) Mia edzo estas .................................... filo.**

| | |
|---|---|
| **A**: la pli alta ol mia | **B:** plej alta kiel mia |
| **C**: pli alta kiel mia | **D**: pli alta ol mia |

**5) La vorto "forko" estas nomo de ....................... .**

| | |
|---|---|
| **A**: manĝebla besto | **B**: instrumento por manĝi supon |
| **C**: manĝaĵo | **D**: manĝilo |

**6) Ne rapidu, la filmo ........................ .**

| | |
|---|---|
| **A**: komencos post 5 minutoj | **B**: komenciĝis antaŭ 5 minuto |
| **C**: komenciĝos pli malfrue | **D**: komencos ne nun |

**7) Kvarono antaŭ la dekdua horo estas.......**

| | |
|---|---|
| **A**: 11.45 | **B:** 19.45 |
| **C**: 12.15 | **D:** 20.15 |

**8) La turistoj veturis al la ĉefurbo .................................... .**

| | |
|---|---|
| **A**: kun la matena trajno | **B**: kun siaj du amikojn |
| **C:** per la matena trajno | **D**: per siaj du amikoj |

**9) ......................................................, mi volas dormi.**

| | |
|---|---|
| **A:** Bonvolu ne telefonu | **B**: Bonvolu ne ĝeni min |
| **C:** Bonvolu silentu | **D**: Bonvolu ĝeni min |

**10) Ne timu, mi ............................................................. .**

| | |
|---|---|
| **A**: diris al li nenion | **B**: ne diris al li nenion |
| **C**: diris pri li nenio | **D**: ne diris pri li nenion |

**11) Hieraŭ nia familio manĝis .................... .**

| | |
|---|---|
| **A**: du kilogramoj da bananojn. | **B**: du kilogrammojn da bananoj |
| **C**: du kilogramojn da bananoj | **D**: du kilogramojn de bananoj |

**12. Zamenhof estis .................................... .**

| | |
|---|---|
| **A:** la kreinto de la internacia lingvo | **B**: hungara judo |
| **C**: infankuracisto | **D**: kontraŭulo de Esperanto |

**13) Li naskiĝis .................................................. .**
- **A:** la dekkvina de decembro en 1859. **B:** la kvindeka de decembro en 1859.
- **C:** la dekkvinan de decembro 1859. **D:** la kvindekan en decembro de 1859.

**14) Mi metis la supujon......................................... .**
- **A:** sur la tablo **B:** sur la tablon
- **C:** meze de la tablo **D:** mezen de la tablon

**15) Estu ĝentila kaj donu ...............................................al via frato.**
- **A:** duonon de la pomo **B:** duonon da pomo
- **C:** duopon de la pomo **D:** duoblon da pomo

**16) La krespon mi manĝas .................................................. .**
- **A:** kun kakao kaj sen tranĉilo **B:** kun kakao kaj forko.
- **C:** per kakao kaj tranĉilo **D:** kun kakao kaj per forkon kaj tranĉilon

**17) Mi multe laboris kaj nun estas ...................................... .**
- **A:** dormenda **B:** dorminda
- **C:** dormega **D:** dormema

**18) Semajnfine mi ne laboros, mi deziras ..................................................... .**
- **A:** ripozi en paco **B:** okupiĝi pri la laboro
- **C:** deĵori en la fabriko **D:** fini miajn laborejajn farendaĵojn

**19) Bedaŭrinde mi ne scias.................... la tranoktado dum la kongreso.**
- **A:** kiom da eŭrojn kostas **B:** kiom da eŭroj kostas
- **C:** kiom longe tenos **D:** kiom longa daŭros

**20) Kiu tago estas hodiaŭ? Hodiaŭ .......................................................... .**
- **A:** estos lundon . **B:** estas lundo
- **C:** estas bela tago **D:** estos bela tago

**21) Dekdu milionoj kvincent kvardek ok mil sepdek ses estas:**
- **A:** 20 548 076 **B:** 12 548 706
- **C:** 12 548 076 **D:** 20 458 670

**22) Piro kaj pompelmuso estas ..................................................... .**
- **A:** bestoj **B:** komputilaj aferoj
- **C:** vestaĵoj **D:** fruktoj

**23) E k s m a l s a n u l e j e s t r i n o estas: .......................................................... .**
- **A:** virino kiu estas direktoro de hospitalo **B:** virino kiu estis malsana
- **C:** viro kiu havis malsanan edzinon **D:** virino kiu estis ĉefo de hospitalo

**24) Gripo estas**
- **A:** malsano **B:** frukto
- **C:** multaj homoj kune **D:** birdo

**25) Nun vi ................................................ . Gratulon!**
- **A:** finigis la teston **B:** finiĝis la testo.
- **C:** finis la teston. **D:** finis la testo.

**Formularo por la solvoj**

| | A | B | C | D |
|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | |
| 2 | | | | |
| 3 | | | | |
| 4 | | | | |
| 5 | | | | |
| 6 | | | | |
| 7 | | | | |
| 8 | | | | |
| 9 | | | | |
| 10 | | | | |
| 11 | | | | |
| 12 | | | | |
| 13 | | | | |
| 14 | | | | |
| 15 | | | | |
| 16 | | | | |
| 17 | | | | |
| 18 | | | | |
| 19 | | | | |
| 20 | | | | |
| 21 | | | | |
| 22 | | | | |
| 23 | | | | |
| 24 | | | | |
| 25 | | | | |

## *Konsiloj por la uzo de gramatikaj testoj*

- La testojn mi uzis precipe por kontroli la nivelon de la lernantoj kaj tiel scii kiuj gramatikaĵoj estas ankoraŭ ne klaraj, kaj ne por turmenti miajn disĉiplojn!
- Similaj testoj servis bone kiam mi komencis labori kun grupo, persono, por mi nekonata sed jam havanta certan nivelon de lingvokonoj.
- La testdemandojn mi klopodas kompili tiel, ke ili enhavu kiel eble plej multe da tiklaj gramatikaĵoj. Alia celo estas ke dum la solvado se la lernanto volas bone respondi al unu punkto ĝenerale renkontu pli ol unu problemon.
- La testoj enhavas 25 punktojn, ĉar tiel mi tuj povas konverti la rezulton je procentaĵoj. /Ĉiu bona solvo valoras 4 %./
- Por la rapida kontrolo mi antaŭe preparas sur travidebla foliospeco la skemon kun solvoj, kaj tranĉas ĝin je la dekstra flanko de la tabelo. Precize metante la travideblan skemon sur la lernantan formularon, sur la dekstra flanko mi povas marki la bonajn solvojn sur la folio de la lernanto. /Atentu, ke vi metu ĝin en la bona direkto!/
- Mi uzas multajn tiajn testojn, do la travidebla slipeto surhavu krom la solvoj ankaŭ la komencan frazon de la koncerna testo, tiel mi ne miksas ilin.
- En aparta dokumento de la lerniloteko, nomita „***Testoformularoj***" vi trovas folion kun kvar tabelkolumnoj. Printu ĝin kaj se vi uzas kun via grupo nur unufoje tian teston distranĉu la kolumnojn /atentu lasi spacon je la dekstra flanko por viaj korektonotoj!/ kaj disdonu ilin al la studentoj. Se vi volas plurfoje uzi tiajn testojn, prefere konservu unu tutan folion por unu lernanto, skribigu lian/ŝian nomon sur la folio kaj ĉiam notigu kiam kiun teston ili solvis. Vi mem skribu la procentaĵojn sub la skemo, tiel bone kompareblas la rezultoj.
- Ĉe grupa laboro la lernantoj finas la solvadon de la testo ne samtempe. Kiam iu finis, signalu al vi, vi povas aliri kaj ene de 1 minuto kontroli kaj dekstraflanke „minuse" indiki la problemajn punktojn. Dum vi korektas la solvojn de la aliaj, la sama studento povas revizii sian proponon kaj ne per x-oj, sed nun per punkto ekz. elektu alian solvon. Tiel ili ne enuas dum la malpli rapidaj ankoraŭ laboras.
- La tuja korektado kaj dono de la rezultoj havas tre motivigan forton.
- Ĉe la fino bv. laŭdemande trairi kune la teston, halti ĉe ĉiu punkto kie leviĝis problemo kaj pritrakti tiun en la grupo. Kelkfoje daŭras longe kaj donas bonan elirpunkton al detala gramatika ripetleciono.

**Solvo por la gramatika testo**

**„Mia profesorino....”**

| | A | B | C | D |
|---|---|---|---|---|
| 1 | X | | | |
| 2 | | X | | |
| 3 | | X | | |
| 4 | | | | X |
| 5 | | | | X |
| 6 | | | X | |
| 7 | X | | | |
| 8 | | | X | |
| 9 | | X | | |
| 10 | X | | | |
| 11 | | | X | |
| 12 | X | | | |
| 13 | | | X | |
| 14 | | X | | |
| 15 | X | | | |
| 16 | X | | | |
| 17 | | | | X |
| 18 | X | | | |
| 19 | | X | | |
| 20 | | X | | |
| 21 | | | X | |
| 22 | | | | X |
| 23 | | | | X |
| 24 | X | | | |
| 25 | | | X | |